

Unuaj Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 470, 1972.10.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni diris kelkajn vortojn pri nia partopreno en la unuaj Someraj Universitataj Kursoj okazintaj en Lieĝo.

A.- La partoprenantoj estis dividitaj en du fakoj : lingvistiko kaj medicino. La profesoroj venis el 8 landoj kaj 3 kontinentoj : Belgio, Britio, Francio, Germanio okcidenta, Hungario, Japanio, Norvegio kaj Usono. La kursoj disvolviĝis en idealaj cirkonstancoj : taŭgaj klasejoj, loĝado en agrabla studenta hejmo, manĝado en memservaj restoracioj, la tuto en vasta universitata bieno.

Cl.- Ni opinias, ke la deziro okazigi helpe de esperanto universitatajn kursojn dum longa periodo respondas al vera bezono kaj pravas, ke nia movado travivas novan metamorfozon.

A.- Jen tre resume la diversaj metamorfozoj, kiujn travivis esperanto.

Cl.- Zamenhof proponis la Lingvon internacian kiel lingvo-projekton en la jaro 1887.

A.- Unua metamorfozo : 1894. Voĉdono rifuzas reformon de la lingvo kaj decidas, ke la lingvo evoluos sen eksteraj intervenoj. Tiu decido permesis al esperanto evolui laŭ la leĝo, ke neologismoj anstataŭas arkaismojn.

Cl.- Dua metamorfozo : 1905. En la unua Universala Kongreso de Esperanto komune akceptita Rezolucio difinas, kio estas la lingvo esperanto, esperantisto kaj la esperantismo. Sur tiu bazo povis kreiĝi socio. Kaj tre rapide ĝi donis al si instituciojn : Lingvan Komitaton, kiu transformiĝis iom post iom al vera Akademio, Universalan Esperanto-Asocion (1908) kaj plej diversajn landajn kaj fakajn societojn.

A.- Tria metamorfozo : ĝi verŝajne komenciĝis post la dua mondmilito, kiam ne-esperantistaj institucioj ekuzis esperanton por fakaj celoj. La uzo de esperanto en nia radio-servo komenciĝis en 1947. Hodiaŭ 19 radio-elsendoj listigis esperanton inter la uzataj lingvoj. Iom post iom gravaj industriaj firmaoj ekuzas esperanton por sia komerca propagando. Kreiĝas labor-grupoj, kiuj celadas la ekuzon de esperanto en la Olimpiaj Ludoj, kaj iom post iom ili aŭdigas sian voĉon. Restadoj fariĝas tradiciaj. Inter ili ekzistas la provoj starigi kursojn. Ni konas la sukceson de la kursoj en Grésillon kaj en Helsingör. Ekzistas iom post iom sufiĉe vasta publiko esperanta, por ke valoru disaŭdigi elsendojn por ĝi, eldoni prospektojn kaj riski la organizadon de regulaj aranĝoj.

Cl.- Tiu tria metamorfozo plene efektiviĝos, kiam ĝi enskribiĝos en gravan institucion, kiu dependos de ekster-esperantaj publikaj instancoj. De tiam esperanto povos marŝi al la konkerado de nova dimensio. Ni povas ĝin antaŭvidi : la enkonduko de esperanto en la internaciajn organizaĵojn. Tiu enkonduko dependos de la ekzisto de konstanta kultura centro, kiu estos preta plenumi plej diversajn serĉadojn kaj estos kapabla formi milojn da spertaj funkciuloj. Ni ne ankoraŭ atingis tiun etapon, sed ni povas diveni la gravecon de la nuna metamorfozo.

A.- Longdaŭraj kursoj, kiel tiuj, kiuj disvastiĝis dum unu monato en Lieĝo plenumas ege gravajn kaj specifajn funkciojn. Ili permesas al esperanto ludi rolon de ĉeflingvo por ĉiaj aspektoj de la vivo. Ili kunigas la klerularon, kiu sen tio estas kondamnita perletere rilati, ĉar en la tradiciaj kongresoj ĉiam mankas la tempo por faka laboro.

Cl.- Ni povis konstati en Lieĝo, ke tiu klerularo rilatas sufiĉe objekte al esperanto, kio estas sufiĉe nova fenomeno. Ĝi kapablas konsideri esperanton kiel studobjekton, ne nur kiel propagand-objekton. Eĉ kelkaj konsideras esperanton kiel nuran lingvan instrumenton. Tio estis sufiĉe karakteriza flanke de kelkaj studentoj en la medicina fakto. Antaŭ ĉio ili interesiĝis pri medicino, kaj esperanto estis por ili tute flanka afero. Tion neniam povos kompreni la ĝenerala esperanto-publiko, por kiu esperanto estas la ĉefa afero, kaj ĉio, kion oni faras per esperanto, estas nuraj kaŭzoj uzi tiun lingvon. Estas tiu sinteno, kiu donas al nia movado tiun koloron de diletantismo.

A.- En Lieĝo la diletantismo estis for, escepte dum la akceptadoj fare de la Universitato, Urbo kaj Provinco. Tiam subite reaperis la propaganda aspekto de la entrepreno. Oni troigis nombrojn, simpligis la problemojn. Ni tre bedaŭris, ke emerito ludis ĉefrolon. Nun alvenis la momento objekte priskribi nian celadon, kaj ni opinias, ke la akceptantaj instancoj estas pretaj aŭskulti tiun priskribon kun intereso, dum la propagandecajn mensogetojn ili facile divenas.

Cl.- Pluraj el vi opinias, ke se universitataj kursoj estas bezonaj al nia movado, oni simple organizu ilin. La realeco estas pli kompleksa. Tri jaroj da laboro estis necesaj por organizi la unuajn Somerajn Universitatajn Kursojn. La venontan jaron ne okazos similaj kursoj, ĉar neniu komitato estis preta transpreni la laboron kaj ĉar la organiza komitato elĉerpis siajn fortojn. Ni konsideru ĝian laboron kiel unuan eksperimenton. Devus formiĝi labor-rondo, kiu analizu la mankojn kaj skizu, kio estus idealaj Universitataj Kursoj. Kaj poste novaj eksperimentoj devus okazi.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !